



# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales) - ☎ 34.38.84

JARA ABONO : 3 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

2-an Kvaronjaro 1973

N° 47



La 8-an de aprilo 1973

## Federacia kongreso Langvedoko Rusiliono Printempa kunveno de la franca sekcio de IFEF

Ja pravis nia amiko Pelletier kiam, ĉe la komitata kunveno en Narbono (oktobro 1972), proponis ĝemeliĝi la Printempan Kunvenon de Esperantistaj Fervojstoj kunigita al nia jara Federacia Kongreso.

Pli ol cent gesamideanoj partoprenis tiun duoblan manifestacion, inter ili Gesinjoroj Hernandez kaj du junaj hispanoj el San Pablo de Ordal. La laborkunsidoj okazis dimanĉon matene ĉe la sama Kultura Domo, kie flirtis granda verda standardo.

La komunaj aranĝoj al ambaŭ asocioj estis variaj kaj allogaj; sabaton posttagmeze, la unuaj alvenintoj vizitis mineja - galerio de Rochebelle kaj la Laboratorio de Citopatologio en la apuda St Christol - les - Ales.

Vespere "Les Farandoleurs Cheminots Nimois" en Provencaj kostumoj prezentis folklorajn dancojn je l'agordoj de "fifres et des tambourins" S<sup>ro</sup> Michel Borso kaj la juna Myriam Chebil ĉarmis nin per siaj kantoj kaj nia samideano Geo Boutin deklamis la faman monologon de Tchekow: "La malbonfaraĵoj de l' tabako".

Plenplena aŭtobuso kaj privataj aŭtomobiloj, kondukis poste la partoprenantojn al St Jean du Gard, kie okazis la komuna manĝo.

Sekvis la vizito de la fama Muzeo de l' dezerto en Mialet, kaj promonado tra la bambua arbaro de Prafrance, unika en Eŭropo. Ni revenis en Alès je la 19-h kaj duono. Oni manprenis unu la alia kaj disigis la manifestaciojn kun "espero al reveno".

## \* Federacia kongreso Langvedoko Rusiliono \*

Ci-jare nia federacia kongreso okazis en Alès lige kun la printempa renkontiĝo de la francaj fervojistoj esperantistaj.

La fervojistoj ekkongresis jam la 7-an de aprilo dum nia federacia laborkunsido estis antaŭvidata por la 8-a de aprilo. Tamen jam la 7-an kelkaj gefederacianoj el la plej malproksimaj urboj venis en Alès. Venis ankaŭ 4 hispanaj gesamideanoj el la Barcelono-provinco. Ĉiuj ĉeestantoj de la sabata vespero povis ĝui la distran programon, post la vespermanĝo, kiu konsistis el folkloraj dancoj fare de la folkloro trupo de la Nimes-aj fervojistoj kaj el diversaj skeĉoj fare de amatoroj.


Dimanĉon dum la fervojistoj kunvenis en alia ĉambro nia jarkunsido komenciĝis je la 9-a ĉe la urba kultura centro. Multaj anoj de nia federacio ĉeestis sed ankaŭ venis pluraj gesamideanoj el diversaj urboj, kiuj ne estas sur la teritorio de nia federacio: Marseille, Avignon, Arles, Privas, Nyons ktp. . .

S-ro LLECH-WALTER, prezidanto de nia federacio, malfermas la kongreson per kelkaj salutvortoj kaj per konciza analizo de la Esperanto-agado naciskale.

Sekvas la financa raporto fare de nia kasisto S-ro DELIGNE. La financa situacio estas tre kontentiga ĉar la bilanco reliefigas pozitivan rezulton. Post sufiĉe longa diskuto estas decidite, ke la propagandafiŝetoj, kiujn presis por ni nia amiko FRUS je vere tre modesta prezo, estos daŭre vendataj 30,00 F. po 100 afiŝoj. La profito eniros la federacian kason.

Oni jam antaŭvidas deficiteton en la buĝeto de nia federacia bulteno "Sudfranca Stelo" malgraŭ la tre favoraj eldonkondiĉoj de nia amiko FRUS rimarku 3 F. jarabono. Okaze de la venonta aŭtuna kunveno de la federacia komitato en Narbonne ni nepre devos tre serioze kaj ĝisfunde pristudi la aferon.

Pri la Esperanto-agado de la diversaj grupoj raportas: Por Alès: S-ro RAYNAUD; Por Béziers: S-ino AUTHIER; Por Montpellier: S-ino VIERNE kaj S-ro LENTAIGNE; Por Narbonne: S-ro DELIGNE; Por Nimes: S-ino VOLPELLIERE; Por Perpignan: S-ro AMOUROUX; Por la Provenca Federacio: S-ro GARRIGUE, federaciestro.



Estas decidite ke la federacia komitato konsistos el la sekvantaj 11 membroj (laŭ la alfabeto ordo):

S-ro AMOUROUX - Perpignan,  
S-ro ANGEVIN - Le Cailar,  
S-ino AUTHIER - Béziers,  
S-ro DELIGNE - Narbonne,  
S-ro FRUS - Nimes,  
S-ro LLECH-WALTER - Perpignan,  
S-ro PELLETIER - Cendras,  
S-ro RAYNAUD - Alès,  
S-ino TERRAL - Béziers,  
F-ino VIERNE - Montpellier,  
S-ino VOLPELIERE - Nimes.

La komitato elektos la federacian estraron okaze de la venonta aŭtuna labor-kunsido en Narbonne.

Pri la agado de U.F.E. okazis baloto (vidu "Revue Française d'Espéranto" n° 276 de marto 1973), kies rezultoj sekvas:

Rajtis voĉdoni: 29 (aktivaj membroj de U.F.E. en 1972)

Voĉdonis: 22

				<u>rezulto</u>
1/ ĉu vi aprobas la agadraporton de U.F.E. por 1972 ?				
JES: 17	NE: 0	SINDETENO: 5	JES	
2/ ĉu vi aprobas la finanĉan raporton ?				
JES: 16	NE: 0	SINDETENO: 6	JES	
3/ ĉu vi aprobas la buĝeton 72-73 ?				
JES: 16	NE: 0	SINDETENO: 6	JES	
4/ ĉu vi aprobas la decidon de la konsilio (protokolo de la 3-2-1973 kaj frontartikolo de ĉi-tiu numero) akiri novan sidejon 4 bis, rue de la Cerisaie, PARIS IV ?				
JES: 19	NE: 0	SINDETENO: 3	JES	

Renovigo de 1/3 de la konsilio: (la nombroj indikas la ricevitajn aprobojn)  
S-ro BOURDEAUX: 22 - S-ro DESPINEY: 22 - S-ro ROUSSEAU: 22 -  
S-ro TORTEL: 22 - S-ino VINCENT: 21 - S-ro MANCEAU: 20 -  
S-ro MICOUD: 20 - S-ino ALBAULT: 17 - S-ro ROYER: 17 - S-ro  
ROUGETET: 15.

Diversaj aferoj estas pritraktataj. Interalie oni diskutas pri la nacia revuo "Revue Française d'Espéranto", kiu, ĝis nun, estis multe tro modesta por la petita jarkotizo (40,00 en la venonta buĝeto). Tamen, nun la revuo estas modernigita, presita kaj laŭŝajne ĝi aperos pli ofte. Urgas varbi novajn aktivajn membrojn (kun abono al la revuo) sed multe dependos de la kvalito de nia nacia revuo. Cu anstataŭ ol U.F.E. havu:

- simplajn membrojn kiuj pagas 8,00 F. kaj ricevas nenion.
- aktivajn membrojn kiuj baldaŭ pagos pagos 40,00 F. kaj ricevas revuon tro modestan,

ne estus eble antaŭvidi 1 solan kategorion kiu, ekzemple, pagus mezan kotizon - 22,00 aŭ 25,00 F. - kaj sisteme ricevus la revuon? Statistikaj kaj financaj elementoj mankas por analizi tiun proponon. Ni ĝin prezentos en Luksemburgo.

S-ro LLECH-WALTER, federaciestro, estos la reprezentanto de nia federacio en Luksemburgo. Li tie prezentos la rezultojn de la baloto pri la agado de U.F.E. kaj la deziresprimon, ke estu analizata de la estraro kaj de la konsilio de U.F.E. la eventuala adopto de unika kategorio de aktivaj membroj de U.F.E. (kompreneble ne inkluzive la bonfarantojn kaj la dumvivajn membrojn), kiuj pagus mezan kotizon kaj devige ricevus la revuon.

Béziers akceptos nian venontjaran federacian kongreson. Intertempe okazos la aŭtuna laborkunsido de la komitato en Narbonne.

La urbeŝtaro akceptis la tutan kongresanaron por honorvino en la urbdomo. Komuna tagmanĝo estis por kelkaj malproksime loĝantaj gesamideanoj la fino de tiu agrabla kongreso. Por multaj ceteraj partoprenantoj la samideana etoso daŭris dum la posttagmezaĵaj ekskursoj. Ni ŝuldas multajn gratulojn kaj dankojn al niaj Gard-aj geamikoj kiuj plene sukcesigis la kongresojn ĉefe Ges-roj RAYNAUD por la federacia kaj S-ro R. PELLETIER por la fervojista. (Protokolis JEAN AMOUROUX, federacia sekretario).

---

## **Pressant appel**

---

Sur proposition du Parti Social Démocrate Italien (P.S.D.I.), le Secrétaire Général de l'Internationale Socialiste a assuré qu'il mettrait à l'ordre du jour de l'une des prochaines réunions le problème d'une langue pour unir les masses laborieuses du monde.

A cette occasion, le représentant italien soutiendra l'adoption de l'Espéranto.

Pour que cette proposition soit acceptée, il est évident qu'il est nécessaire que d'autres représentants nationaux la soutiennent, et il est par conséquent indispensable que les Espérantistes du monde entier agissent partout, pour informer et faire pression.

Il est en particulier nécessaire que les Espérantistes appartenant aux mouvements socialistes, ou sympathisant avec ceux-ci, prennent contact au plus tôt et personnellement avec les directions des partis concernés pour les convaincre d'appuyer la proposition italienne lorsqu'on en discutera.

Il s'agit d'une chance très appréciable qu'on ne peut traiter à la légère. Nous vous invitons donc à agir de la sorte, et vous prions conjointement de donner à notre appel la plus grande diffusion possible.

Le rédacteur de la rubrique espérantiste de Radio Rome,  
Antonio DE SALVO.

# Financa Raporto okaze de la Kongreso en Ales

La 8-an de aprilo 1973

Ĉar ni havas multajn traktendajn aferojn, kaj malmulte da tempo, por ŝpari tiun tempon mi simpligis la prezentadon de tiuĉi bilanco. Sed mi kunportis ĉiujn miajn dokumentojn kaj tiel, se vi deziras, vi povos kontroli ĉion, kion vi deziros.

Mi haltigis tiun bilancon je la dato de la 1-a de Aprilo 1973.

Nia nuna bilanco dividiĝas en tri ĉapitrojn kiuj estas: kaseto, ŝparkaso kaj poŝtakonto kiujn vi povos kompari kun tiuj de la pasinta jaro, pere de la ĉi-suba tabelo.

ĉapitroj	lasta kongreso	aktuala kongreso
Kredito en la kaseto.....	41,35	37,65
Kredito en la ŝparkaso.....	221,14	251,53
Kredito en la poŝtakonto.....	489,82	1072,22
SUMOJ.....	752,31	1361,40

Ni povas konstati ke nia nuna kredito superas la antaŭan je:

$$1361,40 - 752,31 = 609,09.$$

Se laŭ mi la du unuaj ĉapitroj ne alvokas rimarkojn, ne estas same pri la poŝtakonta ĉapitro, ĉar el ĝi ni devas rezervi la monon por "Sud Franca Stelo".

Okaze de la lasta kongreso tiu ĉapitro estis kredita je 167 frankoj.

Depost tiu kongreso, mi ricevis por SFS 468,00, kiuj reprezentas proksimume 156 abonantojn. Mi diras proksimume, ĉar kelkaj el ili pagis pli ol 3,00 Fr.

Sed aliflanke, mi pagis por la materialo kaj presado de nia revuo 265,00 Fr. Do, restas al ni por ĝia funkciado, ĝis la fino de la jaro: 167,00 el la pasinta jaro + 468,00 el la nuna jaro minus 265,00 jam pagitaj; tio estas ekzakte 370,00 Frankoj.

Sinjoro FRUS povos diri al ni, ĉu li opinias ke tiu sumo sufiĉos por funkciigi nian revuon ĝis la fino de la jaro.

Alia grava afero estas tiu, kiun mi nomas: La Kvarkoloraj afiŝetoj, kies kreinto estas nia amiko RAYNAUD.

Por tiu afero, mi elkasigis 228,50 kaj ĝis nun enkasigis 258,90. Do tiu afero alportis al ni profiton el 30,40.

Mi ne scias, ĉu la stoko estas elĉerpita aŭ ne, kaj ĉu ni povas daŭrigi la aferon sen novaj elspezoj. Ankaŭ tie-ĉi Sinjoro FRUS povos doni al ni informojn.



Resume, metante flanken 370,00 por SFS, restos al ni:  $1361,40 - 370,00 = 991,40$  F. per kiuj ni povos fari ĉion kion plaĉos al ni. Pro tio, mi opinias ke nia ĉi-jara bilanco estas sufiĉe kontentiga.

Kompreneble, mi estas je via dispono por respondi al ĉiuj demandoj kiujn vi povos fari.

Tamen mi devas fari personan rimarkon. En nia Federacio estas 6 grupoj. Kelkaj ne ankoraŭ sendis siajn kotizojn, kvankam ni jam estas la 8-an de Aprilo, aŭ ne finis siajn sendadojn.

Aliparte, 25 fojojn mi sendis monon al U.F.E., pro la fakto ke multaj izoluloj daŭrigas sendi siajn kotizojn rekte al mi, anstataŭ sendi ilin al siaj lokaj kasistoj.

Mi tute ne plendas pro la fakto ke tio okazigas kroman laboron por mi, sed pro la fakto ke tio devigas min fari elspezojn kiujn ni povus ŝpari.

Kaj mi turnas min al vi, lokaj kasistoj, kaj reformulas mian peton faritan en la pasinta Oktobro, en Narbono.

La plej eble, arigu viajn kotizojn kaj sendu ilin al mi en ne pli ol du fojoj, ekzemple je la fino de februaro kaj marto.

Preskaŭ ĉiuj kiuj pagas kotizon, jen al U.F.E., jen al U.E.A., jen al ambaŭ asocioj, legas SFS; atentigu ilin pri tiu peto kaj bonvolu pardoni mian postulemon; mi ne batalas por mia propra mono, sed por nia komuna mono, kaj kreskigi nian komunan riĉecon.

## NECESA PRECIZIGO

Tute nevole, en nia lasta Kongreso, mi faris bedaŭrindan eraron, kiu metis nian Prezidanton en malagrablegan situacion, kiam mi asertis ke la grupo de Perpignan ne ankoraŭ pagis siajn afiŝetojn.

La kialo de tiu eraro estas ke, tute kontraŭe, Perpignan estis la unua kiu pagis longtempe antaŭ la aliaj, kaj, kiel kutime, mi enskribis ĝian pagon, kiel ĉiuj antaŭaj, per nigra inko.

Sed, ek de la dua enskribo, mi opiniis ke estus preferinde enskribi la venontajn pagojn per ruĝa inko, por facile kaj rapide trovi la grupojn, kiuj estus jam pagintaj siajn mendojn.

Bedaŭrinde, mi forgesis ruĝe korekti la pagon de Perpignan. Kiam oni demandis al mi, kiuj grupoj aĉetis afiŝetojn, mi kalkulis la grupojn ruĝe enskribitaj, forgesante Perpignan-on.

La sama eraro okazis en la bilanco sen ŝanĝi ĝian ekzaktecon, kaj la vera profito farita pere de la afiŝetoj estas:  $30,40 + 30,00 = 60,40$  frankoj.

Mi nevole, sed publike faris falsan aserton, mi do havis la devon restarigi la veron.

Maurice DELIGNE.



# L'ESPERANTO

---

## et les langues ethniques

Le rédacteur m'ayant demandé d'écrire un deuxième article pour notre "Gazeto", je lui avais déjà montré une ébauche que je voulais intituler "L'Esperanto et les (langues des) minorités ethniques.

Or, j'ai appris au Congrès Fédéral qu'un débat sur les dialectes avait eu lieu à Montpellier, le protagoniste étant un espérantiste étranger.

Supposant que le point de vue de cet esperantiste est proche du mien, je pense qu'un résumé ou un commentaire de ces débats devrait être envoyé par le groupe de Montpellier pour être publié dans Sudfranca Stelo.

Si j'écris en français, c'est parce que je souhaite l'instauration d'un débat auquel les non-esperantistes partisans des dialectes (Occitan, Catalan, pour notre région) devraient prendre une part active.

En guise d'introduction, qu'on me permette quelques remarques :

S'il fut un temps où l'on pouvait envisager l'avènement d'une langue unique pour tous, c'était lorsque l'on pouvait croire possible qu'une ou deux nations occidentales domineraient le reste du monde.

Il devenait déjà utopique d'y croire encore devant la réalité du nombre des grands états européens.

Ceux qui avaient cru que l'esperanto était appelé à jouer ce rôle n'avaient tout simplement rien compris.

La décolonisation et le désir d'indépendance de tous les peuples du monde rendent plus que jamais impossible l'acceptation d'une langue unique.

D'autre part, le fait qu'une nation voit sa langue enseignée (avec des résultats pratiques plutôt mauvais d'ailleurs) bien plus que d'autres langues dans la plupart des pays du monde, ne doit pas nous illusionner... La langue internationale unique formée du mélange des langues nationales les plus avancées ne verra jamais le jour quoi qu'on pense.

L'Occitanie ou la Catalogne ont-elles été colonisées au même titre que Madagascar ? Là n'est pas la question la plus importante.

Tout homme à droit à conserver la langue et la culture de son pays.

Parallèlement, l'évolution des techniques, le désir de paix et de faire disparaître l'exploitation économique de certains peuples par d'autres, le désir des peuples de participer activement aux décisions les concernant,

exigent une intercompréhension entre nations qui parait difficilement compatible avec le nombre des langues ethniques.

La seule solution raisonnable est dans l'adoption d'une langue neutre, internationale, une deuxième langue pour tous.


L'Esperanto répond à cela. L'Esperanto est la seule langue internationale qui ait fait ses preuves.

L'Esperanto est la langue qui doit permettre à tous les peuples, à toutes les minorités ethniques d'échapper à l'oppression culturelle, à la mort lente de leurs langues tout en leur permettant de tenir leur juste place dans le concert des nations.

Lucien ANGEVIN.

P. S. - J'espère que nous recevrons des réactions (y compris des partisans des langues ethniques non esperantistes) leurs questions devraient être publiées dans les prochains numéros.

## POR LA AUTOMOBILISTOJ



Vi certe scias, ke via veturilo povas esti bona reklamilo por nia afero. Multaj el vi veturos al la Luksemburga, al Belgrada, aŭ al faka esperantista renkontoj. Survoje montru la insignon de la Internacia Esperanto Klubo Automobilista (I.E.K.A.) kaj ankaŭ, se vi povas, aldonu afiŝeton kun la vorto ESPERANTO.

Ni intencas starigi kun U.E.A. grandan reton de delegitoj, fakdelegitoj, S.O.S. Aŭtoservo, kiuj havos la taskon helpi al la turistoj, kiam okazos paneo, akcidento aŭ turismaj malfacilaĵoj. - Ne temas pri teknika helpo, sed nur lingva (traduka).

Ni ŝatus, ke en multaj benzinstacioj, apudstrataj restoracioj, hoteloj, gastejoj, oni vidu la adreson kaj telefonnumeron de la S.O.S. delegito en la koncerna regiono.

Por atingi tiun celon, ni bezonas ĉiujn ge-Esperantistojn, kiuj posedas (aŭ ŝoforas) aŭtomobilo(j)n, ne nur unuopajn. Tial - aliĝu multnombre al nia fakasocio. Nur per forta asocio ni povas atentigi la naciajn aŭtomobilistajn klubojn, la aŭtomobil-fabrikojn, -vendejojn kaj -riparerojn pri la valoro kaj taŭgeco de nia internacia lingvo por la internacia turismo.


Se vi ne estas ankoraŭ membro de I.E.K.A., sendu tuj la kotizon - dumvivan - de 6 F. al

J. GUILLAUME  
66, de Grasse Village  
78810 FEUCHEROLLES P.ĉ.k. 1899 91 Parizo

kiu sendos al vi la insignon.




# 5 minutoj da intervalo



*Bedaŭrinde, ni havas lokon nur por unu sola...*




*Ni bedaŭras sed ni alvenis antaŭ ol vi!*



*Kian sensacion oni pruvas, havi presita sian nomon sur ĉiujn ĝurnalojn?*



*Vi povus almenaŭ aliloki vin sur alia sidilo!*



*Ĉiam antaŭen, reprovu.*




*Nun mi ekscias kial ŝi preskaŭ neniam parolas pri sia edzo.*

R. FROIS

# K R U C V O R T O J

## HORIZONTALALE

- 1- Plifortigi (R) — Buŝa promeso
- 2- Insekshomido (R) — Unujara herbo (R)  
Ĝi naskiĝis en jaro 1907 (R)
- 3- Sukcesas fari ke io okazu  
Ĝi estas pli granda ol ĉiuj ĝiaj partoj
- 4- Prefikso montranta parencecon — Famaj tapetoj
- 5- Esti tiu, estas arto (R) — Uzata por eltiri Likvaĵon (R)
- 6- Uzos en la praktiko — Natura sed ne fekundigita ĉelo (R)
- 7- Remetas sidrimedon sur — Loko
- 8- Publika aŭ privata ceremonio (R) — Literumante; hakilo
- 9- Konjunktio — Hermetike fermis
- 10- Esperanta teatraĵo (R) — Rilata al la speco de poezio
- 11- Literumante: Ceremonia vesto  
Brua elspiro (R) Mezepoka asocio
- 12- Franca rivero — Rilata al orela osteto



R. RAYNAUD

## VERTIKALE

- 1- Plaĉa — kapablo atingi iajn rezultojn
- 2- Tute fiktiva afero — Fari instruan paroladon
- 3- Adverbo — sud franca urbo
- 4- konsiligu neniam kun li
- 5- Senkapigita dingo — Konjunktio — kiel la senhaba ĉielo
- 6- Iu doktrino (R)
- 7- Libera de mikroboj — Specio de bovo (R)
- 8- Persona pronomo — Alia persona pronomo — Rabobirdo
- 9- Desegnista ilo — Ekscite tuŝis la sentojn
- 10- Tia estas nia lingvo — 11 — Surskriboj
- 12- Poemoj — Partoj de konstruaĵo kun definitiva destino

\* (R) — nur radiko

\* Solvite tiujn krucvortojn, sed ĉu la 6 vortojn (horizontalaj aŭ vertikalaj) kiuj formas proverbon

\* La solvo aperos sur la venonta S.F.S.

▼

Solve  
de la krucvortoj  
aperintaj sur la N°46

▼

La proverbo  
estas:

**SEN LABORO NE VENAS ORO**

M	A	T	E	R	I	I	S	T	O	S
A	G	A	P	Z	E	B	U	S	E	
L	A	B	O	R	O	I	L	I	O	N
S	T	U	P	E	T	A	R	O	L	
P	O	L	E	N	E	R	O	N	I	C
A	J	O	K	R	A	P	E	T	I	
R	O	O	M	B	R	O	E	K		
U	R	S	I	N	A	M	A	R	A	
L	U	A	N	T	O	P	O	R	T	
O	K	V	E	N	A	S	K	O	R	
T	R	O	B	A	D	O	R	O		
C	I	R	C	L	D	E	V	O	J	